

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2019

Jarkolekto 6 - Numero 1



Miniaturo en mezepoka manuskripto, montranta viron kiu enfosas trezoron.

ENHAVOTABELO

de januaro 2019

Titolpaĝo: Miniaturo en mezepoka manuskripto	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	5
<i>Kvar medaloj pro duobla jubileo en Jugoslavio 1987-1988</i>	
<i>Jubilea medalo okaze de la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof 1859-2009</i>	
<i>Medalo honore al Eroŝenko kaj memore al la 92a UK en 2007</i>	
Spikumajoj & suplementoj	16
Por spuremuloj!	17
Medalistoj: 15 Tadeusz Tchórzewski (°1959)	19
Historiaj aspektoj: Internacia Helpa Mono (4)	21
Aspektoj de numismatiko: Emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj? (5)	22
Numismatika forumo: “Ĉu oni reviziu la spesmilon?” (1) de Terry Watts	23
Terminaro: Alfabeta listo (16)	25
El la gazetaro	26
Retpoŝto	27
Anoncoj & eventoj	34

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

bert.boon@skynet.be
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!


Karaj individuaj kaj asociaj membroj! Karaj legantoj!

Jen la starto de la dua jarkvino de ENA kaj de ĝia revuo “Esperanta Numismatiko”, ambaŭ jam ofte menciitaj kaj rekomenditaj en aliaj revuoj, en la Interreto (Google) kaj aliloke.


Nova starto, do nova defio, novaj laboro kaj... kunlaboro. Fakte, ne nur decas, sed eĉ plezurigas emfazi, ke sen la penoj de multaj el vi la rezultoj de nia asocio nun estus certe malpli bon(eg)aj. Pro tio ni kore dankas unuavice tiujn redaktoraĵajn voluntul(in)ojn, kiuj laŭkapable kontribuis al la plibonigo kaj pliriĉigo de niaj servoj al nia mondvesta ENA-legantaro. Nia plej grava deziro por la jaro 2019 ja estas, ke iompostiome kresku tiu nemalhavebla teamo. Tial ni petas al vi ĉiuj varbi almenaŭ NUR unu novan membron.

Decas do krome emfazi, kiomgrade kreskis la nombro de la ENA-membroj. Ĉu laŭ la redakcio vere indas varbi plejeble multajn membrojn-legantojn? Sendube jes, ĉar nur tial ni povas efike disvastigi mondveste la rezultatojn de la esploroj kaj obstinaj serĉoj kaj helpopetoj al esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Ĉiu el niaj kunlaborantoj laŭ la redakcio meritas la titolon “ambasadoro” de Esperanto kaj de ENA!

Nia memborkvanto, en diversaj kontinentoj kaj landoj, dum la pasintaj kvin jaroj kreskis ĝis 108 individuaj kaj 20 asociaj membroj. Klaran superrigardon donos al vi la jenaj grafikaĵoj :



Tabelo pri laŭlanda nombro de individuaj membroj de ENA



Superrigardo de laŭlanda nombro de asociaj membroj, kiel universitatoj, bibliotekoj, muzeoj kaj diversaj (ne)esperantaj asocioj

Unua trafoliumo jam montros al vi, ke en nia ĉefa rubriko ni ĉi-foje prezentas al vi nur “noblajn” (pag)medalojn, nome kvin arĝentajn kaj unu oran. Inter ili estas kvaropo de jugoslaviaj medaloj el la heredaĵo de nia karmemora honora membro Hans Jankowski, sekve la ununura medalo de Esperanta Civito (nova medalo por 2019 jam estas anoncita de EC!) kaj krome UK-medalo honore al elstara esperantisto kaj verkisto el Ukrainio, Vasil Eroŝenko.

En la rubriko “Numismatikaj Aspektoj” vi trovos taŭgajn konsilojn (laŭ ni!), por sukcese agi se vi, kiel nia Walter Klag, iam emus mem eldonigi (esperantan) medalon. Kial ne, ĉu?

Sekve, en **tute nova rubriko** vi malkovros la unuan serieron de ampleksa serio de artikoloj en kiuj nia brita samideano Terry Watts demandas sin, ĉu indas, eĉ necesus, revivigi la spesmilovaluton. Jen la starto de la **Numismatika forumo**-rubriko!

Konstatu ankaŭ en la rubriko “Por Spuremuloj”, ke nia fidela kaj akurata provleganto Jozefo Horvath mem sukcesis parte klarigi enigmon de belega ĝemeliĝa medalo el Italio kaj ke Alessandro Simonini el Massa (Italio) ankaŭ estas tre kompetenta spuremulo tiurilate!

Kompreneble ankaŭ aliaj tradiciaj rubrikoj ne mankas. Do, vi ankaŭ povos malkovri kelkajn novajn terminojn kaj eble vian propran reagon en la rubriko “Retpoŝto”.

Nun mi silentu, sed nur post kiam mi estos fininta mian epistolon per **tutkoraj salutoj kaj bondeziroj por 2019** al vi kaj al viaj gekaruloj! Kresku ENA!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Duobla jubileo en Jugoslavio 1987-1988

A



Lando: Jugoslavio

Metalo: arĝento (.925)
polurita fono

Diametro: 30 mm

Jaro: 1987

Rando: noĉa

Kvanto: nekonata

Pezo: 11,78 g

Medalisto: nekonata (MA?)

Diko: 2 mm

Averso:

surskribo: 100 JAROJ DE ESPERANTO EN LA MONDO

sube: ★ SFR JUGOSLAVIO ★

meze: stelo kun litero E

super la stelo: 1887 1987

- sub la stelo: • S
E
L
• .925 (titro)
• signoj kaj inicialoj

Reverso:

surskribo: D-ro L.L.ZAMENHOF, AŬTORO DE ESPERANTO

sube: ★ 15.XII 1859-14.IV 1917 ★

meze: busto de Zamenhof, iom dekstren

B deviaĵo 1 (vidu klarigon en la rubriko "Terminaro" sur p. 25!)



Lando: Jugoslavio

Kvanto: nekonata

Metalo: arĝento (.925)
polurita fono

Pezo: 11,97 g

Diametro: 30 mm

Medalisto: nekonata (MA?)

Jaro: 1988

Diko: 2 mm

Averso:

surskribo: JUBILEO DE ESPERANTO - MOVADO EN JUGOSLAVIO

sube: ★ 1908 – 1988 ★

meze: stelo kun litero E

sub la stelo: signo + .925

Reverso:

Same kiel reverso de A (antaŭa medalo)

C deviaĵo 2



Lando: Jugoslavio

Metalo: arĝento (.925)
polurita fono

Diametro: 30 mm

Jaro: 1988

Rando: noĉa

Kvanto: nekonata

Pezo: 11,95 g

Medalisto: nekonata (MA?)

Diko: 2 mm

Averso:

surskribo: JUBILEO DE ESPERANTO - MOVADO EN JUGOSLAVIO

meze: stelo kun litero E

- sub la stelo:
- S
 - E
 - L
 - . 925 (titro)
 - signoj kaj inicialoj

Reverso:

same kiel A kaj B

D deviaĵo 3



Lando: Jugoslavio

Kvanto: nekonata

Metalo: oro (.900)
polurita fono

Pezo: 3,76 g

Diametro: 20 mm

Medalisto: nekonata (MA?)

Jaro: 1988

Diko: 1 mm

Rando: noĉa

Averso:

surskribo: JUBILEO DE ESPERANTO - MOVADO EN JUGOSLAVIO

meze: stelo kun litero E

- sub la stelo:
- S
 - E
 - L
 - .900 (titro)
 - signoj kaj inicialoj

Reverso:

same kiel A, B kaj C



Pri la aktuala valutsistemo de Esperanta Civito:

Karakterizaj elementoj por la tarifoj en la Esperanta Civito estas la referenco kaj la indico al la valoro de la arĝentaj medaloj emisiitaj de la Civita “banko”, kiuj jam de post la Tago de la Esperanta Kulturo 2009 estas utligeblaj kiel mono ene de la Pakto.

La indico okazas laŭ la landostatistiko de la Monda Banko, bazita sur kvar kontingentoj. Tamen eblas esceptoj: ekzemple Bulgario kaj Rumanio situas en la tria, anstataŭ la dua kontingento. La indico proporcio estas 8:4:2:1; tio signifas ke, se por iu servo svisaj pagas ok spesojn, por la sama servo meksikano pagas kvar, bulgario du kaj togolandano unu.

La valoro de la speso estas fiksita je 90 svisaj frankoj. Ĝi varias laŭ la oscilado de la diversaj valutoj, sed ĝuste ĉar la referenco restas ĉiam la sama, ne necesas ŝanĝi la tarifojn aritmetike. Eblas tamen plivalorigo de la speso ĝenerale, lige kun la plivalorigo de arĝento: tiun plivalorigon decidas Fondumo Pro Esperanto.

La speso aŭtomate iĝis referenca por ĉiu servo ene de la Pakto: ekz. la Civitaj legitimiloj (validaj dek jarojn) kostas 0,40 spesojn en la kontingento 1; 0,20 en 2; 0,10 en 3 kaj 0,05 en 1. Centono de speso estas nomata “speseto”.

Kun permeso el Literatura Foiro, n-ro 295, oktobro 2018, p. 297

Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Jubilea medalo okaze de la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof 1859 - 2009



Lando: Svislando

Metalo: arĝento (.999)
polurita fono

Diametro: 31 mm

Jaro: 2009

Rando: glata



Kvanto: 100

Pezo: 13,77 g

Medalisto: Manuel Nájera (Meksiko)

Diko: 2 mm

Averso:

supre: ESPERANTA CIVITO

meze: blazono kun steleto en la supra parto; paralelaj, oblikvaj strietoj en la suba parto

sube: E PLURIBUS ULTRA

Reverso:

ĉirkaŭe: L.L. ZAMENHOF KREINTO DE ESPERANTO

meze: busto de Zamenhof maldekstren

sube: 1859 2009

sub la ŝultro: titolo de arĝento: .999

malantaŭ la kolo: M N

Rimarko 1:

Ĉi tiu pagmedalo havas propran valoron laŭ la valutsistemo de Esperanta Civito: **vidu artikoleon sur paĝo 10!**

Rimarko 2:


Emisiita memore al la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof

Rimarko 3:

Busto de Zamenhof kaj blazono, inspiritaj de la 1912aj jubileaj medaloj de 1 Sm kaj 2 Sm



Blazono de Esperanta Civito



Sekcioj Literatura Kafejo Esperanta PEN



Sekcio Civila Esperanta Servo



Sekcio Feminisma Esperanta Movado

Rimarko 4:

E PLURIBUS ULTRA (latine) :



La moto de la Esperanta Civito situas en la Konstitucio. Ĝi paŭzas tiun de alia tre grava federa subjekto (Usono): **E pluribus unum**. Temas pri elipsa frazo, kies signifo estas “**El pluraj** (subjektoj) **transen** (al nova, pli alta subjekto)”.

Rimarko 5:

Pri “Esperanta Civito”, legu i.a. en Google/Vikipedio kaj en <http://www.esperantio.net/index.php?id-437>

Danke al diversaj anoj de Esperanta Civito kiuj havigis al nia redakcio la suprajn, detalajn informojn.

Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Honore al Eroŝenko kaj memore al la 92a UK en 2007



Lando: Ukrainio

Metalo: arĝento / polurita fono

Diametro: 31 mm

Jaro: 2007

Rando: glata

Kvanto: 300

Pezo: 11,68 g

Medalisto: Roman Ĉajkovskij

Diko: 2 mm

Averso:

en duobla cirklo, supre: UKRAINIO

maldekstre: В А С И Л Ь Є Р О Ŝ Е Н К О

dekstre: VASIL EROŜENKO

sube: steleto

meze: busto de Eroŝenko dekstren

Reverso:

ĉirkaŭe: UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

meze: 92a UK JOKOHAMO 4-11 de aŭgusto 2007

sube: stiligita bildo de ondegaj en la stilo de japanaj UKIO-E-desegnoj kiel “La ondegaj apud la marbordo de Kanagawa” de Hokusai (bildo sur la venonta paĝo!)

Rimarko : reverse-sube: signo de la monerfarejo aŭ de la monerfarejestro





Katsuŝika Hokusai: “La ondego de Kanagawa” (1832)

	<p>Kolekcia moner-signo dediĉita al Vasil Eroŝenko (1890-1952) - ukraina esperanto-verkisto, vojaĝanto, pedagogo kaj al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto (4-11.08.2007, Jokohamo, Japanio) Eldonita dank' al la Bonfara fonduso nome de Vasil Eroŝenko „Espero” (Kijivo, Ukrainio) pere de la monera entrepreno de Ukrainia Nacia Banko.</p>
	<p>Колекційний монетний знак присвячений Василю Єрошенку (1890-1952) - українському esperanto-письменнику, мандрівнику, педагогу та 92-му Універсальному конгресу Esperanto (4-11.08.2007, Йокогама, Японія) Виданий за сприяння благодійного фонду ім. Василя Єрошенка „Espero” (Київ, Україна) банкотно-монетним двором Нацбанку України.</p>

Reklamcela kartona karteto pri la porokaza medalo

Vasil Eroŝenko (1890 – 1952)



Malgraŭ lia blindeco, Vasil, kiu naskiĝis en Ukrainio, multe vojaĝis tra la mondo per helpo de Esperanto. En 1912 li entreprenis sian unuan E-vojaĝon al Britio, kie li lernis en instituto por blinduloj. Printempe de 1915 Eroŝenko vojaĝis Japanion kaj studis masaĝon en blindula lernejo en Tokio. Tie li ageme propagandis por Esperanto inter la blindaj studentoj. Post du jaroj li vojaĝis Siamon (Tajlandon) kaj fondis tie lernejon por blinduloj. Traveturante Hindion, li tie estis malliberigita kaj poste elpelita kiel anarkiisto kaj rusa bolŝeviko. Somere de 1919 li fuĝis tra Ŝanhajo, denove al Japanio. Bone posedante la japanan lingvon, Eroŝenko verkis en tiu lingvo multajn rakontojn por geknaboj kaj tre famiĝis inter la progresema japana literaturistaro. La 1-an de majo de 1921, pro partopreno en laborista demonstracio kaj en kongreso de japana socialista federacio, Eroŝenko estis arestita kaj baldaŭ ricevis elpelordonon. Sekve li iris al Ĉinio kaj en 1922 prelegis pri rusa literaturo kaj aliaj temoj en pekina universitato kaj en edukista kolegio por virinoj.

Originalaj kaj esperantigitaj verkoj de Eroŝenko:

- Turo por fali
- Unu paĝeto el mia lerneja vivo
- Ĝemo de unu soleca animo
- La kruĉo de saĝeco
- Lumo kaj ombro
- Rakontoj de velkinta folio
- La tundro ĝemas (el la japana)
- Malvasta kaĝo (el la japana)
- Stranga kato (el la japana)
- Cikatro de amo (el la ĉina)

En 1923, dum la UK en Nurenbergo, li gajnis la unuan premion en konkurso pro lia bonega prononco de Esperanto, deklaminte sian originalan poemon "Ciganino". La verkaro de Eroŝenko ĉarmas pro la tre ege simpla, sincera, iom naiva kaj sentimentala enhavo.

Fonto: - Enciklopedio de Esperanto (Hungara Esperanto-Asocio; Budapeŝto, 1986)

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Prezoj en stelo ankoraŭ en 1967!

VERKOJ DE VILHO SETÄLÄ	
Esperanta Legolibro,	elvendita
Vortaroj Esperanta-Finna kaj Finna-Esperanta, elvenditaj	
Esperanto-kurso, fabloj, kun glosoj finnaj aŭ svedaj	3 steloj
Taglibro de kongresano, facila legolibreto	3 steloj
Burĝonoj, infanoj en poezio kaj fotografio, grandformata verko kun tutpaĝaj bildoj	10 steloj
Privilegia vojo al lingvoscio – Esperanto, ĉe ŝatata rektametoda lernolibro, kun instrukcioj en diversaj lingvoj	13 steloj
Malŝlosilo finna (vortareto finna-Esperanta)	3 steloj
Esperanto – moderna lingvo, verkita de Setälä, Vilborg kaj Stöp-Bowitz	15 steloj
TRADUKOJ:	
LINNANKOSKI, Batalo pri la domo Heikkiä	3 steloj
KIVI, Sep fratoj (kun Ilmari Ekström), tole bind.	10 steloj
ERKKO, Spegulo homarana	4 steloj
Mendu ĉe via libroservo aŭ ĉe	
LIBROSERVO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO	
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando	
En Finnlando demandu en librovendejo aŭ mendu ĉe	
FONDUMO ESPERANTO, Iirislahti, telef. H-ki 882170	
Prezo broŝurite 32 steloj (8 mk), bindite 60 steloj (15 mk)	

Koverta dorsflanko de la libro "Fortoj de l' vivo" (1967) de Vilho Setälä, kun prezoj en "stelo"

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj aŭ pri kies detaloj ni scias malmulte aŭ preskaŭ nenion! Celo de ĉi tiu rubriko estas: rikolti per via helpo plejeble multajn informojn, por kompili plejeble kompletan katalogon.

Naŭa enigmo parte solvita !



1. Pri iame enigma detalo

La prosperigo de la germana kuracostacia urbo Bad-Kissingen ĝuis favoran venton, kiam Balthasar Neumann, komisiite de la princo-episkopo Friedrich Karl von Schönborn-Buchheim, en la jaro 1737 translokigis la Frankajn Salonojn sud-okcidenten kaj plialtigis la kuracostaciajn ĝardenojn, por protekti la Maks-fontanon kaj la Pandur-fonton kontraŭ inundoj.

Iam konata sed dume forgesita fonto, kiu troviĝis en la tiama fluejo de la salonoj, denove estis malkovrita kaj ĝi ricevis, laŭ la nomo de la transilvania monarko Francisko Rákóczi 2a, la nomon “Rákóczi-fonto”.

La sciencisto Reinhard von Bibra sukcese klarigis la nomigon de la fonto laŭ la nomo de tiu hungara monarko, pri kiu la scienco tamen ĝis hodiaŭ ne trovis pruvon ke li iam vizitis Bad-Kissingen. Eble la nomo estis “adoptita” de veteranaj oficiroj de la vurburga dragonregimento, kontraŭ kiu Francisko Rákóczi 2a batalis dum la hungara liberiga milito.

Fonto: Wikipedia

Esperantigita el la germana (Bert)

Ni kore dankas nian Jozefon Horvath pro liaj nemalhaveblaj informoj pri la maldekstra alegoria persono.

2a Mesaĝo sendita de s-ro Alessandro Simonini en 2018

Pri la medalo de la ĝemeliĝo Massa-Bad Kissingen: en la jaro 1960, estis realigitaj de skulptisto Riccardo Rossi medaloj, du el oro, dekkvino el arĝento kaj ĉirkaŭ cent el metalo, mi kredas, el bronzo aŭ simila alojo. La du oraj medaloj estis donitaj al la urbestro kaj la estro de la konsilio, tiuj el arĝento estis por la komunumaj skabenoj, kaj la ceteraj estis je dispono de la dezirantoj. Ili hodiaŭ estas netroveblaj kaj valoregaj. Mi sukcesis trovi kvar medalojn el arĝento: unu apartenas al la filino de la skulptisto, alia al skabeno Oliviero Bigini, tria al iu membro de nia Filatela kaj Numismatika Rondo (kiu ne volas vendi ĝin je iu ajn prezo, malgraŭ ke mi estis proponinta al li tre altan monsumon), kaj la lastan mi vidis antaŭ kelkaj jaroj en nia rondo, sed mi perdis ties spurojn. El tiuj metalaj, kiuj siatempe estis multnombraj, ankaŭ neniuj plu troveblas, eble iu havis unu sed aŭ li ne konsciis pri ties valoro, aŭ ĝin perdis aŭ eĉ forĵetis, aŭ li scias, kiom ĝi valoras kaj tial ĝin li kaŝas.

Pri la demando de s-ro Boon, nome de kiu estas la vizaĝo de la persono je la dekstra flanko, en tiu ĉi momento mi ne konas la respondon, sed mi petos klarigojn al iu arkitekto, specialisto pri skulptaĵoj kaj medalarto. Tial s-ro Boon devas ankoraŭ pacience iom atendi.

Riccardo Rossi elfaris maketon havantan 30-centimetran diametron, en gipso, kiu troviĝis en la Ŝtata Arkivo; la maketo bedaŭrinde ne plu ekzistas. Per pantografo, por ĝin redukti, estis poste realigitaj la medaloj. La matrico estis poste uzita en 2009 por realigi aliajn medalojn (logike ke la surskribaĵo estis ŝanĝita, sed la bildoj restis la samaj) okaze de la inaŭguro de la katalogo de la Nacia Biblioteko pri Esperanto, videbla sur la paĝaro de *reprobi* (**Reto de bibliotekoj de provinco Massa**).

2b Dua mesaĝo de s-ro Simonini, iom antaŭ Kristnasko 2018

Mi serĉis informojn por s-ro Boon: mi petis ilin de Sergio Torre, membro de la Filatela kaj Numismatika Rondo, sed ĉefe studemulo kaj pasia interesito pri la ellaboraĵoj de skulptisto Riccardo Rossi. Mi kredis, ke li estus doninta al mi tuj kelkajn informojn. Li asertis, ke Rossi skulptis multajn medalojn, surhavantajn virinajn vizaĝojn, sed laŭ momenta fantazio, sen ia ajn rilato al iu ajn modelino aŭ pozistino. Tamen li certigis al mi, ke li donos al mi post kelkaj tagoj la deziratajn informojn. Tiam mi demandis al arkitekto Claudio Palandrani, iama docento ĉe la Belarta Akademio en *Carrara*, plie fakulo pri arkitekturo, skulptarto kaj desegno kaj konanto de signifo de simboloj. Ĉar mi kredas ke, en la medalo estas kaŝitaj signifoj kaj simboloj, kiujn ni devus malkaŝi. Bedaŭrinde, ĝis nun neniuj funde ĝin pristudis, aŭ skribis artikolon, kaj la skulptisto mortis jam antaŭ tridek jaroj, samkiel la inspirinto de la medalo, kiu – mi scias – estis Mario Dazzini, ankaŭ li mortinta en 1985. La medalo estis prezentita oficiale en la dato de la ĝemeliĝo Massa-Bad Kissingen, ĉefverko de amikeco itala-germana, danke al la agado de Mario kaj Catina Dazzini (la fratino de Mario) kaj de Hugo Roellinger, ĉiuj esperantistoj, por superi la malfeliĉajn memorojn pri la mondmilito, ĉesinta antaŭ malmulte da jaroj. Resume ĉi medalo havas malantaŭ si memoraĵojn kaj amikecajn kaj pacajn sentojn, kiujn ni espereble sukcesos remalkovri.

La redakcio ege dankas sinjoron Simonini, kiu havigis la informojn en la du mesaĝoj al nia Elda Doerfler, kiu tradukis por "Esperanta Numismatiko" la tekstojn el la itala, pro kio ni tutkore dankas ankaŭ ŝin.

MEDALISTOJ

15 Tadeusz Tchórzewski (°1959)



Tadeusz Tchórzewski estas ofte premiita pola skulptisto kaj medalisto, kiu naskiĝis en 1956 en Varsovio. Diplomiĝinto de la Ŝtata Altlernejo de Plastikaj Artoj en Varsovio kaj de la Fakultato de Skulptado de Varsovia Akademio de Belaj Artoj. Krome Tadeusz akiris diplomon kun distingo ĉe prof. Jerzy Jarnuszkiewicz. En 2010 li ricevis altan gradon en la kampo de plastikaj artoj ĉe la Fakultato de Skulptado de la Akademio de Belaj Artoj en Varsovio, krome ĉe la Fakultato de Arkitekturo. Li estis implikita en krea, profesia kaj pedagogia laboroj en la fakultato de EEZ. Li kunlaboras kun la pola Mint kaj en diversaj artaj laborejoj. Li sukcese kreis sennombrajn skulptaĵojn kaj medalojn. Tadeusz multfoje prezentas siajn verkojn en Pollando kaj eksterlande kaj estas gajninto de multaj konkursoj.



Ĉi tiun esperantan medalon ni jam priskribis en la jarkolekto 1, numero 4, p. 5

Inflacia mono en Germanio 1923



100.000 markoj de 01.02.1923




500 miliardoj da markoj de 15.03.1923



1 duiliono da markoj, 05.11.1923

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Internacia Helpa Mono (4)




En la jaro 1922 en Germanio la inflacio abrupte ekplirapidiĝis. Je la fino de tiu jaro la prezoj de varoj estis kvindekoble pli altaj ol je la jarkomenco. La Laborista Esperanto-Grupo Düsseldorf tial provis solvi siajn financajn problemojn per emisio de “monbileto” en valoro de 50 markoj.

La bileto n-ro 17 estas vere raraĵo: ĝi estas la **ununura ĝis nun konata**

ekzemplero. En 1990 ĉi tiu bileto estis vendita en Hamburgo – dum aŭkcio pri raraj monbiletoj – kontraŭ 500 germanaj markoj (proksimume 250 eŭrojn)! Ni ne scias, ĉu ekzistis aliaj nominaloj.

La mezuroj estas 130 x 85 mm. Maldekstre troviĝas steleto kaj la orda numero 17.

Hans Jankowski esperantigis la germanan tekston sur la kreditbileto:



Fonto: Hans Jankowski “Esperantomono”, Libera Esperanto-Asocio / Germanio (LEA/G) 2000 (dua eldono), p. 24

Daŭrigota

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Emisii medalojn: ĉu nur por riĉuloj? (5)

Strategio por eldoni medalon (konkreta ekzemplo)

1. Fiksu maksimuman buĝeton!
2. Materialo: decidu nur post kiam la medalisto estos menciinta la eblajn metalojn kaj la akordantajn prezojn por la sama kvanto, kun la sama diametro kaj sama pezo!
3. Kvanto: prefere inter 300 kaj 500 ekzempleroj. Se vi ekzemple intencas mendi 500 ekzemplerojn, unuavice kalkulu la vendoprezon de unu ekzemplero surbaze de la tuta sumo. Tiel vi scios, kiom da ekzempleroj vi minimume devas vendi por regajni la pagotan sumon. Ekde tiu kvanto + 1 ktp, la profito estos 100%!
4. Skizo: priskribu (eventuale desegnu) detale surpapere kaj la averson kaj la reverson.

- averso: (ekzemple!) *ende*: ĉirkaŭskribo kun teksto:

“Lahtio 20-27 julio 2019 * La 104-a Universala Kongreso de Esperanto”

eble: stel(et)o + stiligita bildo de urba simbolo aŭ konstruaĵo/monumento, eventuale fama objekto en muzeo aŭ la urba oficiala emblemo ktp.

eventuale: la oficiala emblemo de via UK.

- reverso: busto aŭ statuo de finna esperanto-pioniro kun ĉirkaŭa teksto (liaj nomo kaj vivodatoj).

Rimarko! Jam (tro?) multe da medaloj montras la buston de Zamenhof!

5. Serĉu adresojn de lahtiaj (aŭ finnaj) medalistoj en Interreto aŭ pere de arta(j) akademio(j) aŭ numismatika(j) asocio(j)!
6. Demandu al la medalisto kiom kostus arta desegnenda skizo, eĉ se vi tamen poste ne mendus! Atente pristudu antaŭ la definitiva mendo la skizon kaj detale kontrolu la tekstojn! **Mi iam vidis honoran medalon por Ivo Lapenna kun nur unu litero “n” en lia nomo!**
7. Sukceson! Nepre kontaktu la redakcion, se io ne estus klara!

NUMISMATIKA FORUMO

Ĉu oni reviziu la spesmilon?

Terry Watts

Enkonduko



Sinjoro Terry Watts

La konstanta strebemo de esperantistoj elpensi kaj uzi internacian valuton (Unu Mondo, unu Lingvo, unu Mono!), kiel faris de Saussure surbaze de la spesmilo kaj Andreo Cseh de la stelo, post ili tute ne malaperis en Esperantujo, male.

*Unuflanke Walter Klag (Aŭstrio), per freŝdata emisio de arĝenta 100-stela pagmedalo, emfazas tiun strebon kaj aliflanke Terry Watts (Britio) cerbumas pri “reviziita spesmilo”. Tion li entuziasme kaj fakule klarigas en serio de artikoloj unue publikigitaj en “La Brita Esperantisto”, el kiuj la redakcio de ENA **en ĉi tute nova rubriko** nun publikigas kun permeso de la aŭtoro la unuan el kvin ege aktualaj kaj legindaj ĉapitroj de la sama eseo.*

La spesmilo reviziata (1)

Kiam en 1907 oni unue proponis la ideon de Esperanto-mono, la valutoj de multaj landoj baziĝis je oro – t.e. la monunuoj estis difinita kiel egala al certa pezo de pura oro.

Tiel, iasence la mondo jam havis internacian monon, almenaŭ ĝis tiu grado, ke kiu ajn de la tiam cirkulantaj or-enhavaj moneroj havis fiksitan kaj facile rekoneblan valoron en alia lando (se tiu lando ankaŭ submetigis sian valuton al la or-normo).

Tamen, oni proponis la spesmilon. Tiun monon, nesurprize, oni difinis ankaŭ surbaze de oro. La specifigo estis tia, ke en ekvivalento je oro 10 spesmiloj egalas 1 britan suverenon (£1). Tiutempe la pundo, kredeble pro la forto de la Brita Imperio, eble estis la plej fidata valuto.

Do, kiom valoris tiam unu speso?

Nu, la spesmilo valoris je dekono de pundo, 2 ŝilingoj aŭ 24 malnovaj pencoj. Tiel unu speso = 24/1000 malnovaj pencoj, do proksimume 10 spesoj = 1 fartingo, aŭ kvaron-malnovpenco.

Tio unuavide ŝajnas absurde eta monsumo por la speso, sed pensu ke antaŭ la Unua Mondmilito unu pajnto da biero kostis nur 3 malnov-pencojn (3d). Tiel por unu pajnto da biero vi estus elspesinta **125 spesojn**.

Sed kiom kostus hodiaŭ tiu biero en speso?

La or-enhavo de la suvereno (la moneroj ankoraŭ elstampiĝas ĉe la Reĝa Stampejo en Kimrujo) valoras £230 (proks.). Tiel unu spesmilo = £23, kaj unu speso 2,3p (nunaj pencoj) – kaj (tamburado!) se oni prenas la koston de pajnto da biero je £3, tiam hodiaŭ via biero kostus **130 spesojn**.

Ĉu ne eta miraklo, kiam oni konsideras la inflacion (monvalor-perdiĝon), kiun oni spertis en Anglujo ekde 1907. Kaj ĉu ne argumento por revivigi la spesmilon?

Kompreneble, se oni elektus alian varon por fari komparon inter la tiama kaj la nuna prezo en speso, oni eble ricevus alian rezulton. Estas multaj faktoroj, kiuj havas influon sur la kosto de specifa varo – ŝanĝoj en teĥnologio, en la produkto-metodoj, en la proporcio, kiu estas labor-kosto, ktp.

Sed ĉu vi povas trovi modernan valuton, kiu ne perdis enorme sian valoron, de kiam proponiĝis la spesmilo?

Eble vi krius, ke la prezo de oro estas mem ne-stabila, do tiel or-bazita valuto same ne estus stabila.

Kaj vi pravus ke ekde 1971, kiam oni fine rompis la ligan inter oro kaj la dolaro, kaj ĉiuj valutoj ‘ekflosis’, la prezo de oro en dolaroj kreskis forte. Tiam \$35 por unco, nun \$1300.

Sed jen filozofia problemo. Ĉu oro plivaloriĝis aŭ ĉu la dolaro senvaloriĝis?

Indas relegi la saĝajn vortojn de la ekonomikisto David Rikardo, kiu jam en 1817 diris ‘La sperto ... montris, ke nek ŝtato nek banko iam havis la liberan povon eldoni papermonon sen fiprofiti de tiu povo’. Por ĝisdatigi tiun penson, oni devus etendi ĝin al la kreo de elektronika mono, sed la principo restas.

Sed ĉu la esperantistoj povus realigi orbazitan monon – do revivigi la spesmilon? Jes, kaj tio estus multe pli simpla ol vi eble imagus. En sekva artikolo mi esploros tiun temon, kaj montros kiel procedi.

Viaj komentoj estos bonvenaj! (Aldono de la redakcio)



Daŭrigota

TERMINARO

Alfabeta listo (16)

Deviaĵo: *intenca ŝanĝo en jam ekzistanta tipo, ekzemple por fiksi novan jarindikon, titron, ktp. Ankaŭ koncernas monbiletojn, kiuj ankaŭ povas havi deviaĵojn.*

Ekserguo: *suba parto de la monerfiguro, tradicie apartigata per strio. En ĝi oni pregas mallongajn datumojn kiel monvaloro, monersigno, jarindiko ktp.*

Forĵetaĵo: *metala pormonera disketo, kiu estas netaŭga por monerfarado. Krome monbileto malaprobata pro fuŝa pregado.*

Kolektomono: *monero aŭ medalo kun aŭ sen oficiala pagvaloro kun permeso aŭ laŭ mendo de oficiala instanco. Ĉefa celo: profito per vendado al kolektantoj. Post kelkaj jaroj restas nur la valoro de la metalo. Ekzemple la amaso de t.n. olimpiaj "moneroj".*

Misstampo: *erara, senintenca devio pro mekanika farado de hodiaŭaj moneroj aŭ medaloj.*

Moka medalo: *ekde ĉirkaŭ 1550 estis farataj medaloj, kies monerfiguroj celis moki samtempajn personojn aŭ situaciojn. Malpli popularaj kaj ŝatataj ekde la 18a jarcento. Unu el la pli malnovaj estas medalo kun duobla portreto. Kiam oni turnas la medalon je 180°, la portreto de la papo iĝas portreto de la diablo.*

Platetrubaĵo: *rubaĵo uzata kiel krudaĵo en la metalfandejo. Post la truado de la pormoneraĵaj disketoj el metalplatetoj, kaj post sekva purigado, la restaĵoj estas denove fandataj. Pasintecce la monfareroj havis propran fandejon; nuntempe la metalfabrikejoj fandas la metalojn kaj liveras la disketojn.*

Postmorta monero: *monero kun la portreto kaj/aŭ la nomo de mortinta reganto. Konataj ekzemploj estas la arĝentaj moneroj, emisiitaj post la morto de Aleksandro la Granda aŭ la famegaj taleroj de Maria Theresia, faritaj kun la jarindiko 1780 eĉ ĝis en la 20a jarcento.*

Prova nadlo: *ora aŭ arĝenta plata ingoto kun antaŭfiksita kaj kontrolita titro. Tiaj ingotoj en pligrandiĝanta titra vico celas mezuri la ekzaktan titron de oraj aŭ arĝentaj moneroj.*

Ŝanĝita stampo: *pro ĝustatempa malkovro de eraroj de la cizelisto, pasintecce oni korektis la stampon. Plejofte estis uzata tiucele stampil(et)o por ŝanĝi detalojn de la stampo.*

Varianto: *senintenca kaj senfunkcia deviaĵo. Dum la epoko de manfarataj moneroj la stampocizelisto senintence foje deviis de la postulita baza ŝablono. Dum la sekva epoko (ĝis hodiaŭ) mekanika cizelado nur hazarde kaŭzis tiajn erarojn. Tamen, eĉ okaze de novaj serioj de moneroj aŭ medaloj foje okazas kelkaj misstampoj.*



Currency Wiki

50 spesmilo coin | Currency Wiki | FANDOM powered by W...

50 spesmilo coin

The **50 spesmilo coin** is a former **commemorative coin** of the **Esperanto movement**. It, along with 1 and 2 spesmilo pieces of similar design, was issued in **1912** in commemoration of the 25th anniversary of *Unua Libro*, the first publication describing Esperanto. The piece was authorized by the **Ĉekbanko Esperantista** or **Swiss Esperantists** and struck by the Swiss watch case and medal-making firm **Holy Frères**.

The piece was presented to **L. L. Zamenhof** (1859–1917), the creator of Esperanto, at the 9th **World Esperanto Congress** in **Bern** on **August 24, 1913**. It was mentioned in an article by *The New York Times* the next day, and briefly described by *La Revuo* in late 1913.

The coin is composed of **gold**. An illustration of **L. L. Zamenhof** appears on the **obverse**, and a depiction of a **shield** featuring the **green star** is illustrated on the **reverse**.

Only one example of the piece was manufactured. Its status and whereabouts are currently unknown.

References Edit

- **Esperanta Numismatika Asocio** – "Esperanta Numismatiko" (2015) (Esperanto)
- **Klag, Walter** (April 2017). "Esperanto-Mono". *Esperanto*. (Esperanto)
- **Esperantismo kaj mono on the Esperanto Wikipedia**

Ĉi tiun artikolon sendis al la redakcio nia Walter Klag, pro kio ni kore kaj numismate dankas lin.

50 spesmiloj	
General information	
Movement	Esperanto movement
Value	₮50.00
Years	1912
Measurements and composition	
Composition	gold
Appearance	
Obverse	L. L. Zamenhof
Reverse	Coat of arms
v · d · e	

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

11.10.2018 11:31

Kara amiko Jozefo!

Apenaŭ kredeble, sed tamen: la ENA-revuo jam ekzistas preskaŭ kvin jarojn! Dank' al via helpo, la lingvouza kvalito dum la lastaj jaroj ege kreskis.

Do mi denove petas vin provlegi la novan numeron. Mi tutkore antaŭdankas vin kaj paciencie atentos la resendon.

Amike kaj numismate,

Bert

15.10.2018 6:42

Kara Bert,

antaŭ ĉio plej koran gratulon por ĉi tiu bela jubileo! Vi ne nur plezurigas numismatojn kaj interesigantojn per via bela kaj utila revuo sed ankaŭ kultivas la faklingvaĵon de Esperanto, kio estas tre necesa kaj valora tasko. Do akceptu krom mia gratulo ankaŭ mian koran dankon!

Amike: Jozefo



20.10.2018 10:07

Karaj membroj kaj legantoj!

Unua okazo por celebri la unuan jarkvinan feston por la revuo de ENA. Antaŭ viaj okuloj troviĝas la kvara numero de la kvina jarkolekto. Ni dankas vin pro via fideleco, ĉar neniu el vi ĉesis esti membro de ENA. Ni, kiel kutime, deziras al vi tre agrablan legadon. Reagoj bonvenaj!

Mag. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko



20.10.2018 10:27
Dankon kaj saluton
Antonio De Salvo

20.10.2018 10:31
Elkoran dankon, kara Bert!
Walter

20.10.2018 12:28
Gratulojn kara, mi tralegos ĝin plezure, amike Bardhyl

20.10.2018 16:40
Dankon Bert,
Ege interese!
Samideane,
Eŭheno Kovtonjuk

20.10.2018 17:01
Koran dankon, Bert.
Mi gratulas pro via sukceso fondi kaj funkciigi la asocion.
Alfred Schubert
prezidanto de TEĴA

20.10.2018 20:04
Dankon pro via revuo, kiun mi trovas pli kaj pli interesa.
Amike
Renato Corsetti

20.10.2018 23:33
Dankon pro via revuo, mi ĝojas ricevi ĝin.
Jean Bosco

21.10.2018 6:10
Kara s-ro Bert Boon,
Kun danko mi ricevis vian karan revuon.
Via redaktado de la revuo kaj senpaŭza laboro por numismatikaĵo estas alte taksindaj.

Esperante via laboro daŭros, mi kore salutas.
Sincere via, Jungkee

21.10.2018 14:08

Farite: <https://hdl.handle.net/11013/5503>

Amike,
Ana Manero
Biblioteko Juan Régulo Pérez

24.10.2018 17:47

Mia kara Bert!

Mi tre kore dankas pro via sendo de la 4a EN: mi nur "trafoliumis" ĝin ekrane, sed jam rimarkeblis ke la kompostado estas nun perfekta kaj ke la revuo estas 36-paĝa, tiel ke mi povos ĝin presi senprobleme. Mi feliĉegas pro tio! Vere elstara! La rapida rigardo ne malhelpis min noti ke ankaŭ Triesto kaj kongreso aperis. Koran dankon pro via kunlaboremo. Unu afereto: mi ne plu trovas la numeron trian de EN: ĉu vi estus tiel ĝentila alsendi? Koran dankon!

Amike, Elda

25.10.2018 23:14

Kara amikino kaj samideanino!

Kun multe da ĝojo, kiel kutime, mi ricevis vian mesaĝon. Kiel kutime krome vi tro laŭdas nin pro la revuo, sed ni ege ĝojas, ke ĝi daŭras plaĉi al vi. Ni volonte respektis vian deziron pri la nombro de paĝoj kaj ni ne forgesos tion, mi esperas, en venontaj numeroj!

Morgaŭ mi petos Vivi sendi al vi la mankantan numeron.

Amike kaj tutkore,

Alberto

25.10.2018 18:47

Kara Alberto.

Saluton.

Mi pardonpetas pro ĉi tiu malfrua reago post via sendo. Mi dankas vin kaj deziras bonan evoluon al nia Asocio. Mi nun estas serĉanta aliajn senegalajn kunlaborantojn. Pro tio mi intencas organizi kunvenon por paroli pri ĉi tiu asocio al ili .

Antoine.

25.10.2018 23:17

Kara Antoine!

Dankon pro via afabla reago kaj pro la bonkora deziro.

Organizi kunvenon por prezenti nian asocion estas tre bona ideo. Multan dankon al vi!

Amike kaj numismate,

Bert

26.10.2018 13:48

Ege dankon pro via respondo. Mi estas tre feliĉa. Kiel vi prave diris estas tre grave de tempo al tempo paroli pri nia Asocio al aliaj esperantistaj geamikoj. Pro tio mi planas ĉeesti al Ilei renkonto kiu okazos en Benino la venontan monaton se mi havas financajn rimedojn por povi renkonti kun aliaj afrikanaj esperantistaj.

Antoine.

28.10.2018 7:51

Multajn dankojn:

Adri

30.10.2018 8:36

Saluton, estimata Bert!

Okaze de la jarkvinjariĝo de la revuo "Esperanta Numismatiko", mi sendas al vi koran gratulon el Dominika Respubliko. Tre ŝatas al mi legi la revuon de ENA ĉar ĝi estas tre interesa, la artikoloj estas bone skribitaj kaj la fotoj abundaj.

Longa vivo al ENA kaj al ĝia revuo!

Amike kaj plej altestime,

Rafael D.



20.10.2018 20:10

Bert,

La UMEA-medalo el 1989 troviĝas ankaŭ en la kolekto de la Fondaĵo Vanbiervliet. Mi kompletigis ĝian priskribon en la datumbazo (http://archivo.alcl.be/_bezoek/object/obj_extra_info.php?objid=0011) per la informoj el la ENA-revuo.

Roland

20.10.2018 22:11

Saluton, Roland!

Jen vere agrabla sciigo. Ni esperas ofte per nia laboro servi la Fondajon Vanbiervliet kaj se eble denove kunlabori por la sama celo: progresigi la esperantan kulturon.

Amike kaj numismate,

Bert



29.12.2018 18:27

Karaj amikoj de ESK,

Feliĉan Novjaron! Jen la ligilo al la nova numero de *La Riverego*, la revuo de Esperanto-Societo Kebekia! <http://www.esperanto.qc.ca/wp-content/uploads/2018/12/Riverego132-33.pdf>

Multaj bonegaj aferoj okazis ĉe ni en 2018: okazis pluraj sukcesegaj aranĝoj, aperis pluraj artikoloj kaj intervjuoj pri Esperanto, kaj estis multegaj pozitivaj evoluoj pri la UK: reklamado en Lisbono, pretigo de la logotipo, eldono de reklamiloj, kreo de la Unua Bulteno, nomumo de respondeculino pri ekskursoj kaj antaŭkongresoj, kaj multe-multe pli. Unu grava afero por aparte atenti: jam eblas aliĝi al la volontula teamo ĉe la UK en Montrealo-2020! <http://tiny.cc/volontuloj2020>. Aliĝu al la teamo de volontuloj kaj helpu sukcesigi la plej grandan Esperanto-eventon en Nord-Ameriko! Kompreneble, ni ankaŭ invitas vin plusendu la alvokon volontuli (kaj *La Riverego*) al viaj amikoj esperantistoj!

Koran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis kaj helpis! Apartan dankon, kiel ĉiam, al Francisko kaj Silvano, pro la korektado! La limdato por kontribui por la sekva numero estas la 20a de aprilo, 2019.

Amike,

Ĵenja Amis, la redaktoro

01.01.2019 9:50

Saluton Ĵenja!

Unue mi volonte reciprokas viajn bondezirojn por deziri al via lando grandan sukceson organizi la Kongreson. Dankon pro la ligilo al la nova, interesa numero de La Riverego.

*Mi kunsendas informcelan artikolon, eble por la sekva numero de via revuo, pri la ebleco **senkoste aboni** la revuon de tute nova fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio”, pri kio mi parolis kun vi en Lisbono.*

Ĉu la LKK-anoj jam preparolis la okazon eldoni medalon okaze rilate la UK-n? Pardonu mian scivolemon, sed nia fakgrupo evidente ĝojus pri tia projekto, tute nova en Nord-ameriko...

Amike kaj numismate,

Bert Boon

Belgio

01.01.2019 16:25

Kara Bert,

Dankegon pro la bondeziroj kaj la komplimentoj pri Riverego! Mi kredas ke ni eble abonis vian revuon por nia asocio (dankegon!). Kaj jes ni ja preparolis la eblon eldoni medalon, kaj ni ŝatus tion fari. Garry Evans gvidos tiun projekton (mi certas li kontaktos vin pri ĉio). Bonan Novjaron!!

Amike,

Ĵenja

01.01.2019 11:53

Kara Ĵenja,

Dankon pro la bona novaĵo pri la nova medalo.

Mi scias, ke fakte Garry (bonvolu saluti lin!) abonis la ENA-revuon. Per artikolo en La Riverego, mi eble povus informi aliajn legantojn, kompreneble se la redakcio konsentus! Dankon!

Kore,

Bert

02.01.2019 15:24

Jes, neniŭ problemo aperigi en La Riverego! Ĉu vi volas sendi la tekston de anonco tiel ke vi volas ke ĝi aperu? (eble sendu ankaŭ bildon de la unua paĝo de unu el la lastaj numeroj). Dankon!

Amike,
Ĵenja

02.01.2019 9:39

Kara amikino!

Jen la informa kaj varbila tekstoj, kune kun la titolpaĝo de la nova, fine de januaro aperonta numero. Multan dankon!

Bert

02.01.2019 15:41

Tre bone, dankon! Mi petas sendi la revuon (elektronike) al mia retadreso (ne necesas malŝpari monon por presi kaj sendi papere, sed mi ja ŝatus ricevi elektronikan version). Dankegon!

Amike,
Ĵenja

04.01.2019 20:14

Saluton, Ĵenja!

Multan dankon!. En la nomo de Esperanto-Numismatika Asocio mi bonvenigas vin kiel 109an individuan membron de nia nova fakgrupo. Vi estas la unua kanada esperantistino kiu aliĝis, espereble ne la lasta, ne la nura!

La unuan numeron de la sesa jarkolekto de "Esperanta Numismatiko" vi ricevos tre baldaŭ, oficiale je la fino de januaro. Post ricevo vi mem decidus ĉu vi petos aŭ ne (ni esperas ke jes) ĉiujn jam aperintajn numerojn de la kvin unuaj jarkolektoj (4 numeroj jare). Papera versio ne ekzistas, kiu ebligas al ENA sendi la revuon tute senpage, senkoste!

Kun bondeziroj por la nova jaro!

Amike kaj numismate,

Bert Boon



A N O N C O J

&

E V E N T O J

La 15an de novembro 2018, en la renoma aŭkciejo Dorotheum, okazis aŭkcio de moneroj, interalie de Stelo-moneroj.

Jen la rezulto.

<https://www.dorotheum.com/auktionen/aktuelle-auktionen/kataloge/list-lots-detail/auktion/13552-munzen-medailen-und-papiergeld/lotID/1719/lot/2469640-esperanto-steloj.html?currentPage=28&results=sold>

Salutas Walter

Lot Nr. 1719

DOROTHEUM
SEIT 1707

Language / Sprache

AUKTIONEN SPARTEN ÜBER UNS SERVICE myDOROTHEUM

AUKTIONEN » aktuelle Auktionen » Münzen, Medaillen und Papiergeld - Esperanto- Steloj

Zurück

Esperanto- Steloj


erzielter Preis**
EUR 80,-
USD 90,-
Rufpreis
EUR 80,-
USD 90,-

+43 1 515 60 323

▼ DETAILS ZUR AUKTION
Münzen, Medaillen und Papiergeld
Datum: 15.11.2018, 10:00
Auktionsort: Palais Dorotheum Wien
Besichtigung: 09.11. - 14.11.2018

Esperanto- Steloj

Serie zu 1, 5 und 10 Steloj 1959 (geprägt 1960) sowie AR 100 Steloj 2018 (geprägt 2017) zum 150. Geburtstag von Rene de Saussure (1868-1943), =Auflage AR nur 1000 Stk.! = dazu Kunststoff 1, 3 und 10 Steloj 2012 der Esperanto Jugend sowie Kunststoff Jeton (2017) der Esperanto Stadt Herzberg am Harz.I/PP



Sinjoro Jan Moens, redaktoro de la asocia Jarlibro de “Europees Genootschap voor Munt - en Penningkunde” (“Eŭropa Asocio pri Numismatika Scienco”), petis nian redaktoron verki por la Jarlibro 2018 nederlandlingvan artikolon pri esperanta numismatiko.

Ĝi troviĝas sur la paĝoj 59 ĝis 74; temas pri Esperanto ĝenerale, pri iamaj esperantaj monvalutoj, pri ENA, sekve la aŭtoro montras 20 grandformatajn, kolorajn bildojn de esperantaj medaloj kun klarigoj. Krome ĝi enhavas bibliografion.

Kopioj estis jam senditaj al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, al la Biblioteko de la Vanbiervliet-fonduso en Kortrijk (Belgio) kaj al la “Hereda Biblioteko Hendrik Conscience” en Antverpeno (Belgio), tri el niaj 20 asociaj membroj.

Ĉiu el vi rajtas senpage peti perretan (nederlandlingvan!) kopion en PDF!

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam komplete manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum malpli ol kvin jaroj ĝis 109 individuaj membroj kaj 20 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dis en la mondo.

Agrable por ĉiuj estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi LAŬPETE tuj ricevos perrete ankaŭ ĉiujn jam aperintajn kaj senpete sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”